

# La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache.

Herausgegeben unter der Mitwirkung des Dr. Esperanto (Dr. L. Samenhof) von Chr. Schmidt, Vorstand des Welt-sprachevereins in Nürnberg.

Erscheint monatlich einmal.

Zu bestellen auf der Post und in der Buchhandlung von Heerdegen-Barbeck in Nürnberg.

Preis 1 Mark für das Vierteljahr (durch die Post 1.15 Mk.).

Anzeigen werden angenommen zu 20 Pfennig für die Petitzeile.

Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Sub la kunlaborado de Dr. Esperanto (Dr. L. Zamenhof) eldonata de Chr. Schmidt, prezidanto de la klubo mondlingva en Nürnberg.

Eliras unu fojon en la monato.

Oni povas aboni sur la poŝto kaj en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nürnberg.

Kosto 1 marko por ¼ de jaro (per la poŝto 1 marko 15 pf.).

Anoncoj estas akceptataj por 20 pfenigoj por la petitlinio.

Nr. 8.

Nürnberg, 25. Majo 1890.

1. Jahrgang.

## Pri la ŝanĝado de la lingvo internacia.

### 1. La leksikologia demando.

Kredante, ke la demando, pri kiu sinjoro E. de Wahl skribis, estas tiel grava, ke ĝi ne povas tro multe esti pripensata, mi kuraĝas ankaŭ diri kelkajn vortojn por la sama celo. — Se Volapük, kiel ni ja kredas, falos pro ĝia malnatureco, certe nur tia lingvo, kiu estas tute kaj plene natura, anstataŭigos sur ĝia reĝa trono.

Antaŭ mallonge mi praktike vidis ekzemplon je la graveco de tiu ĉi demando. Mi rekontis lingvolertan kontoriston de Stockholm, kiu skribas kaj parolas multajn lingvojn. Mi penis interesigi lin por la lingvo internacia. Komence la lingvo multe al li plaĉis, sed kiam ni venis al vortoj kiel **animo**, **proksime**, **facile**, **libere**, li ekkriis: „ne, **neniam** mi volas tiel parolante detrui mian sencon por la akcento, ĉar ĝi estus por mi malgajno tiel granda, ke nenia mondlingvo povus ĝin bonigi.“ Tiel diros multaj, kaj tiu malbonaĵo malhelpos la aferon. Kontraŭe, se la leĝoj filologiaj estos respektitaj, samatempe la lingvo kontentigos la sciencan kaj la praktikan uzadon plifaciligos.

Ankaŭ el la sveda lingvo mi volas citi ekzemplojn, kiuj fortigas la regulojn, kiujn E. de W. nomis. La vorto **artikolo** svede estas nomata sing. „artikel“, plur. „artiklar“; **regulo** sing. „regel“, plur. „regler“; **sukero** „socker“, verbo (inf.) „sockra“ — la mallongaj vokaloj estas forglutitaj —; el **facilis** fariĝis „fal“ k. c.

Feliĉe la aŭtoro de la lingvo internacia plej ofte obeadis tiujn regulojn, kaj en la malgranda vortaro malmultaj vortoj ilin rompas. Tial ni esperu, ke ĝi povos esti plibonigita en tiu punkto sen tro grandaj ŝanĝoj. De la reguloj kiujn E. de W. fine starigas, la unua kredeble estas nesufiĉe por tiu speco de vortoj. Cetero mi trovas ilin bonaj, tamen kun tiu-ĉi almeto al le du unuaj: „sen ŝanĝo, se la akcento kaj ortografio permesas. Se tiel ne estas, la ŝanĝo estos farata laŭ postirantaj reguloj: . . .“. Atendante ke sinjoro E. de W. kaj aliaj bone eltrovos tiujn ĉi regulojn mi ne penos tie-ĉi ilin starigi; mi nur volas diri mian malsupre pli vaste priparolitan penson, ke la itala lingvo meritas esti prenato en rigardo ĉe la decidado de tiu afero.

Nur tuŝante unu vorton mi volas mem fari proponon. La sufikso **ul** al mi ŝajnas ne bona. Ĝi alportas nenaturan akcenton, estas ne bela kaj maloportuna pro iaj aliaj vortoj, ekemple **postul'** — **postuloj** devus havi signifon konforman kun **antaŭuloj** (vidu „Dua Libro“ paĝon 48). Anstataŭe mi proponas vorton, kiu samatempe povos doni al la lingvo

artikolon nedifinitan se tia, kiel mi kredas, sin montras bezona — vidu „proponon“ V. **Riĉulo** tiam — en ĝia nova formo **riĉuno** — fariĝos preskaŭ vorte = ein Reicher.

Miaj ceteraj projektoj tuŝas aliajn partojn de la lingvo, se ili eĉ iom tuŝetas la leksikologian demandon.

### 2. La ortografio.

Lingvo tutmonda devas tiom eble eviti ĉiajn apartaĵojn, kaj tio ne nur en la leksikologia signifo de l'vortoj, sed ankaŭ en la elparolado. Aparte la frikativaj dentsonoj, riĉaj je nuancoj, alportas malfacilecon en la internacia interkomunikigo. Mi kredas, ke lingvo internacia bone faros, se ĝi ne starigos tro malvastajn limojn por la apartaj sonoj de tiu klaso.

Tial mi trovas deziriinde, ke **ŝ** kaj **j** estu unigitaj en unu sono kaj ricevu unu literon. Tio sama povas sen malutilo sed kun gajno esti farata kun **s** kaj **z**. La svedoj inter aliaj tute ne havas la sonon **z** kaj malfacile elparolas ĝin. **Z** estas ankaŭ tre malofte renkontata en la lingvo internacia kaj povas tie facile aŭ esti anstataŭita per aliaj literoj, aŭ mem ŝanĝi la sonon. — Mi faris multajn provojn anstataŭigi ankaŭ la sonon **ĝ** per ia alia, sed mi timas, ke tio ĉi povus konduki al nefilologiaj vortformoj. Oni ne devas forgesi, ke la lingvo esperanta staras plej proksime al la romanaj lingvoj kaj en la elparolado plej similas je la itala lingvo. Se ĝi ne estos nenatura miksaĵo de sonoj el malsamaj tempoj de la kreskado kaj formado de la vivantaj lingvoj, oni devas tial rigardadi aparte la leĝojn de la lingvo itala. Kaj kiam sin montras, ke en du tiel diferencaj lingvoj, kiel la itala kaj angla el la sono **g** en konstantaj okazoj fariĝis **ĝ**, ĝi eble estus tro malscience skribi **ĉ** aŭ **ŝ** aŭ **g** anstataŭ **ĝ**. En iaj vortoj tiu ŝanĝo estas ebla, sed en aliaj certe ne bona.

Kun la dirita celo mi volas kunigi la penon kiom eble liberigi la lingvon de la supersignitaj literoj. Tiuj ĉi literoj estas granda malhelpo en la presejoj kaj la skribado kun **h** estas sciencie tute forĵetinda. La demando pri la superliteraj signetoj ŝajnos eble malgrava, sed oni devas ja konfesi, ke se ni pensas pri la estonteco de la lingvo, en tempoj, kiam ĝi estos la lingvo de la tuta mondo kaj skribita de milionoj, la sumo da laboroj kaj malfacilaĵoj, kiun ili prezentos, ĉu forgesitaj, ĉu skribataj, sin montras kiel peza balasto, kiun la homaro devas portadi. La espero, ke novaj formoj por iaj literoj estos enkondukitaj, kredeble restos vana: en unu aŭ du presejoj ĝi povos fariĝi, sed — la presejoj de la tuta mondo!

En mia provo mi eliras el tio, ke la nuna sono **z** estos

frigata el la lingvo internacia. La litero z tiam povos esti uzata por ia alia sono.

Mi parolas nur pri konsonantoj. Tuŝante la ŭ mi trovas la kaŭzojn por ĝia restado iom pli fortaj ol la kontraŭaj, sed la tuta demando estas ja negrava.

### Propono I.

#### § 1.

Z estos elparolata kiel en la germana kaj en la itala lingvo, t. e. = c laŭ la nuna elparolado de tiu ĉi litero en la lingvo internacia (ts).

C estos elparolata kiel nun ĉ, ankaŭ tio ĉi laŭ la itala lingvo (la estantan nuancon ne rigardinte). — Laŭ tio oni skribos ekzemple; **grandezo** anstataŭ **grandeco**, **belezo** anst. **beleco**, **kondico** anst. **kondiĉo**, **felice** anst. **feliĉe**, **cirkaŭ** anst. **ĉirkaŭ**.

Tiu ĉi ŝanĝo efektiviĝos jene:

- 1) Ĉiuj vortoj kun ĉ forĵetas la supersigneton.
- 2) La plej multaj vortoj kun c restas sensanĝe, sed la elparolado fariĝas nature alia, ekzemple **komenco** estos elparolata **komenĉo**. La postirantaj vortoj je c estas ŝanĝataj tiel:

**danc** fariĝas **dans**, **ec** — **ez**, **palac** — **palaz**, **pec** — **pez** (tiel itale), **plac** — **plaz**, **kurac** — **kuraz**; eble **nees** — **neses**.

Anstataŭ ĥ oni povas skribi c.

- 3) La vortoj kun z ŝanĝas tiun ĉi literon je s. Neŝanĝitaj restos nur **uz** kaj **raz**. **Azeno** fariĝas **asno**. Mi permesas al mi rimarki, ke mi rigardas nur la malgrandan vortareton. En la plena kaj meza vortaro pli multaj vortoj estas skribataj per z kiel **gazeto**, **pazienzo**, laŭ decidotaj reguloj. Tiel same tuŝante c kaj ĉ.
- 4) Por la vortoj jam internaciaj, kiuj finiĝas je — **tio** (cio) regulo estu starigita ĉu ili devas esti skribitaj — **cio**, — **zio**, — **co**, aŭ — **zion**. Se la regulo pri la akcento ne estas ŝanĝifa, mi proponas la lastan skribadon, ekz. **redakzion**.

#### § 2.

Ĵ estos anstataŭito per la litero por la sono ŝ aŭ per j. Tiel mi proponas **juri** anst. **ĵuri**. Pro **ĵet** oni trovas eble alian formon, tiel ekzemple „jekt“, kiu efektive estas pli internacia ol **ĵet** (komparu: **projekt**, **injektim**, **subjekt**, **objekt** k. c.) Por la sufikso **aj** oni skribos plej bone **aŝ** aŭ laŭ venonte **paragrafo ax**.

#### § 3.

Ke la sistemo de konsonantoj plene liberiĝu je la super-literoj signetoj, mi volas fine anstataŭ ŝ kaj ĝ proponi du novajn literojn: **x** kaj **z** (la **z** de la „fraktura stilo“), aŭ se tiu ĉi litero ne konvenas kun la latinaj, **y**. Por la sono ĝ mi elektis la signon **z** (aŭ **y**) pro la forma simileco. **X** anstataŭos ŝ (= hispane).

Tio ĉi alportos jenajn ŝanĝojn en la vortaro:

- 1) En la vortoj kun ĝ oni ĉiam anstataŭigas tiun ĉi literon per z (aŭ y). Ekzemple **arĝento** (aŭ arĝento) = **arĝento**, **horlozo** (horloyo) = **horloĝo**, **farizi** (fariyi) = **fariĝi**. La malbelan „ĝoj“ mi volas anstataŭigi per „gaud“.
- 2) El la vortoj kun ŝ kelkaj povas ricevi s aŭ sk anstataŭ x, nome: **spar**, **spruc**, **stof**, **soel**, **strump**, **stup**, **skrank**, **skuld** (Tiel ŝanĝitaj = svede). En la ceteraj vortoj oni skribas x anstataŭ ŝ, ekzemple **frex** = **freŝ**, **kalex** = **kaleŝ**, **xajn** = **ŝajn**, **xancel**, **xerc** aŭ **xerz** = **ŝerz**, **xi** = **ŝi**, **xip** = **ŝip** k. c.

Mi volas rimarki, ke inter tiuj ĉi proponataj ŝanĝoj ĉiu paragrafo estas sendependa de la ceteroj kaj povas esti akceptata por si mem sen la aliaj.

### 3. La gramatiko.

Estas ja nedisputeble, ke la formado de l' verbo en la gramatiko Esperanta estas mireginde bona. Ankaŭ en la deklinacio de l' substantivo certe neniu volos ian ŝanĝon. La du proponoj, kiujn mi nun volas fari, ne estas ŝanĝoj, sed aldonoj. — Ĝi estus grandega gajno por la lingvo havi apartan, nekunmetitan formon por la pasivo. Ĉar: 1) La lingvo fariĝus pli multeforma kaj riĉa je malsamaj esprimoj. Aparte por la prezio mi kredas ke tio ĉi estus utilege. 2) La longeco de la lingvo, kiun oni ja plendas, tiel malgrandiĝus. — En la intereso precipe de la poezio, por kiu la signifiĝo de la genitivo per aparta finiĝo estus tre dezirinda, mi volas ankaŭ rimarki, ke la aŭtoro por la formoj **ies**, kies k. c. lasas sciati, ke li rezervis la finiĝon — **es** — **s** por la genitivo, se ia tia sin montrus dezirinda. Laŭ tio

**Propono II:** 1) en la vortareto (germana) estos enmetita: „**ern**, Gegenstand sein für . . . , bezeichnet das Passiv; z. B. **bapt**, taufen — **bapt-ern**, getauft werden, **trov**, finden — **trov-ern**, gefunden werden“. — 2) En la poezio estos permesata uzi la finiĝon **-es**, **-s** por signifi genitivan anstataŭ **de**. La nuna vojo por formado de l' pasivo kaj genitivo nature restos.

Anstataŭ „**ern**“ mi ankaŭ pensis je la latina vorto „**ens**“, kiu tamen estas iom malpli bonsone kaj konvena. Ĉiu vidas ke tiaj novaj formoj per la pasivo kaj genitivo ekster la nunaj donus al la poezio multegon de rimoj bonaj, neparolante pri la grandaj elekteleblaj, per kiuj la lingvo tiel estus riĉigita.

Kontraue la formoj de l' pronomo **min** ne kontentigas, kvankam la genio de la aŭtoro ankaŭ tie ĉi ellumas. Mi havas nek tempon povi elpensi ion alian, nek kompetencon, ĉar tiu ĉi demando estas malfacila kaj grava. Tamen mi deziras diri kelkajn vortojn pri ĝi tiel bone kiel mi komprenas; la saĝoj poste juĝu.

Unue mi volas demandi: kial ne en analogio kun „**kioma**“ k. c. skribi **iela**, **kiela** k. c. (irgendwie beschaffen u. s. w.) anstataŭ **ia**, **kia** k. c. Ĉe tia skribado tiuj vortoj estus per si mem kompreneblaj, anstataŭ ke ili nun estas por multaj popoloj (ekz. germanoj kaj aparte ni svedoj) tre malfacilaj. La uzado de la formoj je **-a** tiam povus esti pensataj malsame; nur pro pleneco mi faris certan proponon pri ili.

Mi permesas al mi tie ĉi memori, ke en kelkaj punktoj, ekz. la uzo de **ĉiu**, **ĉia**, la vortaroj kaj la praktiko en la lingvo internacia tute ne konsentas.

Tuŝante due la pron. pers. mi havas ankaŭ unu proponon. Samatempe mi povos montri la neceson de la klarigo de kelkaj demandoj pri la adjektivo.

Estas malkonsento inter la uzado de **ĝi** kaj la reguloj por **tiu** — **tio**, **kiu** — **kio**. **Tio**, **kio** k. c. estas neniam uzataj pri difinitaj objektoj, sed **ĝi** estas uzata iam tiel same nedifinite, iam pri individuo. Mi citos ekzemplon je la nuna duebla senco de „**ĝi**“. Laŭ la ekzemploj, sur la paĝojn 19 kaj 21 en la „Dua Libro“ („**ĝi** estas jam tro malfrue; nun estas varme; la nokto estas varma“) oni devas diri: „**ĝi** estas varme“. Sed je la demando: „**ĉu** la fero estas varma?“ oni ja devas respondi: „**jes**, **ĝi** estas varma“; „**ĉu** la vetero estas varma?“ — „**ne**, **ĝi** estas malvarma“. Alian bonan ekzemplon vi trovas sur la paĝo 37 de la sama libro: „**Ĉu** vi scias, kiu loĝis en la domo? **Ĝi** estis la plej bela (das Schönste oder die Schönste?) de ĉio, **ĝi** estis la poezio. Mi restis tie tri semajnojn, kaj tio ĉi estas tiel same, kiel se oni vivus trimil jarojn kaj legus ĉiujn verkojn poeziajn kaj instruitajn, — tion ĉi mi diras, kaj **ĝi** estas vera“ (= la poezio estas vera!?) — Kiu aŭ kio estas vera (vere)?

Dezirante liberiĝi la lingvon je tia neklareco kaj dusenceco, mi provis la regulon de Volapük „**ĉiuj** vortoj, esceptinte la nomojn de virinaj estaĵoj, estas viraj (maskulinaj).“ Tiam

li rilatus al ĝi tute kiel kiu al kio. Sed ankaŭ tiel ducencaĵoj estis penseblaj, kaj la regulo de Dro. Esperanto estas el logikaj kaj aliaj kaŭzoj pli bona ol la volapŭka. — Le vojo, kiun mi volas proponi, ŝajnas mira.

**Propono III:** Por la neŭtro de la pron. person. mi proponas ekster ĝi la novan vorton **io**, kiu respondos al **io**, **tio**, **kio** k. c. „O“ estas la subst. finiĝo, kaj per „I“ riu-ĉi vorto proksimas unue al la pron. pers. de la 3a pers. „li“ kaj due al la artikolo. La reguloj — pensitaj en germana vortaro kaj gramatiko — fariĝas: „ĝi-er, sie es; Pron. pers. der dritten Person; von Sachen: vertritt nur ein gewisses Substantiv“ — „io-es; bezieht sich immer auf einen Satz oder ein Verhältniss.“

En multaj vivantaj lingvoj la neŭtro de l'pron. pers. estas uzato kiel artikolo en esprimoj kiel: **la plej bela de ĉio**. Tiel same mi proponas: **io** plej belo = das Schönste; **la plej bela** = der, die Schönste.

**Propono IV:** Kiel mi diris, mi proponas ankaŭ la enkondukon de la formoj **iela**, **tiela**, **kiela** k. c. La formoj **iu**, **tiu** k. c. estos uzataj, se la pronomo staras absolute; la formoj **je** — **a** se ĝi staras kunigita kun substantivo. La plena fondigo de la propono III estus pli vasta. Tie ĉi mi nur volas diri, ke kiel bone kaj ĝuste alie estas ne tro multe dividetadi la komprenojn en la lingvo internacia, tiel necese estas, ke **en la pronomo** la lingvo havos ĉion bone distingitan kaj klaran, ne donante placon por ia malcerto. La praktikado kaj provado montros, ke mi estas prava.

Oni ne respondu, ke en aliaj lingvoj la neŭtro de la pron. pers. havas tian saman duoblan sencon. Lingvo arta ne devas en la gramatiko imiti aliajn lingvojn (plej mal multe en iliaj malklarajoj), sed antaŭ ĉio alpeni logikecon kaj klarecon. Ekster tio la formado de la gramatiko Esperanto havas siajn apartajn postulojn kaj konsekvencojn, kiuj ne egale povas esti trovataj en aliaj lingvoj.

Jen estas fine mia supre nomita leksikologio propono:

**Propono V:** Anstataŭ „**ul**, Person, die sich“ k. c. la vortaro havos: „**un**, ein; Person, die sich durch . . . unterscheidet; z. B. **jun**, jung — **jun'un**, Jüngling; **avar**, geizig — **avar'un**, Geizhals.“

#### 4. Ekzemploj.

Mi donas fine ekzemplojn de la lingvo laŭ miaj proponoj. Ili estas ĉiuj prenitaj el la „Dua Libro“ de Dro. Esperanto, kaj mi ĉiam antaŭ skribas la paĝon, sur kiu ĉia ekzemplo estas trovato. P. 32. La pordo kontraŭe ankaŭ malfermernis je l'vespero, sed tie ĉi estis mallume, almenaŭ en la antaŭa cambro — el interne aŭdernas musiko, kiu al la alilanda instruituno xajnis ne esprimeble bela. Sed eble zi (yi) estis tiela nur en lia xajnevido, car li trovis tie ĉion ne esprimeble bela (aŭ belan). La mastro de l'alilanduno diris, ke li ne scias, kiu lozas (lojas) en la kontraŭa domo, ke oni tie ne vidas ja ec unu personon, kaj pri la musiko — li trovas zin (yin) malbele enuiga. Lo estas tiel, kiel se uno ripetas pezon, kiu estas por li tro malfacila — ĉiam tia samo pezo. — P. 32. La floroj staris ankoraŭ en ilia antaŭa belezo. — P. 36. De ia skuldo tie ĉi ne povas ja tute esti parolo. — Mi tre gaŭdas pro via felico. — P. 35. Sur ĉiaj fingroj brilis ringoj kun diamantoj, kiuj ĉiaj estis veraj. — P. 34. Tio ĉi estas efektive cagrene — tio ĉi estas tute prudente — lo estis cagrene. — P. 35. Kiel tio ĉi estas eble! — P. 36. Lo ja estas multege mirinde. — P. 37. Cetere estis efektive mirinde — tion ĉi mi diras, kaj, kaj lo estas verve. — P. 38. Tio ĉi estis bone. — P. 41. Sed.

A. F. Punnett.

## El la Kondukanto Internacia de A. Grabowski.

### Sur la fervojo.

La kondukto. Sinjoroj vojirantoj, mi petas sidigi.

- A. Ni iru, rapide, sidigu.  
 B. Ne metu nin tiel proksime de la lokomotivo.  
 A. Ni penu ricevi lokon proksime de l' pordo.  
 B. Mi plivolvas turni la dorson al la lokomotivo por ne havi la venton kaj polvon.  
 A. Mi aŭdas la trian sonoradon; ni forveturas.  
 B. Jen la fajfo de l' forveturo. — Kiel longa estas la vagonaro!  
 A. Ne elmetu la kapon tra l' fenestro. — Vi scias eble, ĉu la vagonaro haltas en X?  
 B. La libreto de vojo diras ke ĝi pasas sen ekhalto.  
 A. Mi aŭdas fajfon de vagonaro kiu alvenas.  
 B. Kia rapideco!  
 A. Ni jam transkuris tri kilometrojn.  
 B. Rigardu la belan viadukton, kiun ni tuj traveturos.  
 A. Ŝajnas ke ĝi estas tiel solida kiel bela.  
 B. Tenu prete viau bileton.  
 A. Kial?  
 B. Ĉar oni devas montri ĝin ĉie: ĉe l' enirado en la atendejon, sur la stacio de alveno kaj dum la veturado je ĉiu postulo de la kontrolistoj.  
 A. Kaj se mi ĝin perdus?  
 B. Vi pagus la koston de via loko, kalkulitan de l' distanco la plej malproksima.  
 — Vi sen dubo enskribigis viajn pakaĵojn?  
 A. Jen estas la karto de ricevo, kiun oni donis al mi.  
 B. Konservu ĝin bone, por povi ĝin redoni ĉe la repreni de via vestaĵo.  
 A. Kiam ni haltos por matenmanĝi?  
 B. Post duonhora ni estos en la bufedo.  
 A. Tio pli bone, ĉar mi komencas senti malsaton kaj soifon.  
 Kiel longe oni haltas?  
 B. Bonan kvaronon da horo.  
 A. Kiel sin nomas tiu-ĉi stacio?  
 B. Ĝi estas la stacio G.  
 A. La vojisto faras signojn kaj la vagonaro haltas. Ŝajnas al mi ke la maŝino eliras el la reloj kaj ke la kaldrono perdas vaporon tra la ventoliloj.  
 B. La timo venigas vidi multajn aferojn. La maŝinisto ekprenis la haltilojn ĉar ni proksimiĝas al ŝanĝejo de reloj.  
 A. Kio estas la nigra subteraĵo, kiun mi vidas tie malsupre.  
 B. Tunelo.  
 A. Mi ne amas traveturi tunelojn.  
 B. Mi ankaŭ ne, aparte se ili ne estas bone lumigataj.  
 A. Ĉu estas tre longa tiu-ĉi subteraĵo?  
 B. Ne tro longa, sed sufiĉe profunda.  
 A. Dank' al Dio! jen ni elveturis el tiu ĉi profundaĵo.  
 B. Kaj jen ni alvenis al la bufedo. K. c.

### Avizo kaj peto.

La plaj multaj edukitaj homoj ne sin interesas por ia afero kiu en la unua tempo estas senutila al ili. Tio estas la kaŭzo kial nia afero tiel malrapide progresiĝas. Tial estas tre grava eltrovi rimedojn kaj vojajn kiuj ebligas ke ni povas esti utila al tiuj personoj kiuj estas ankoraŭ indiferentaj tuŝante nian afero. Tiu ĉi rigardo estas la motivo kial ni fondis Asoziationon por la korespondado internacia. Ni kredas ke sur tiu ĉi vojo estas ebla gajni ne malgrandan nombron da novaj amikoj, kiuj ekster tio ne aliĝus al nia afero. Tial ni petas ĉiuj de niaj amikoj, kiuj estas emaj helpi nian entreprenon, sciigi nin la lingvojn en kiuj ili povus korespondi. Se ni

ricevos sufiĉan nombron da helpantoj ni publikigos la statutojn kaj tuj komencos nian laboron.

La direkciono de l' Asoziaciono por la korespondado internacia en Nürnberg:

Julius Schmidt, komercisto, Marienstrasse 14

Joseph Gagel, instruisto, Schonhoverstrasse 10.

La subskribitaj sinjoroj estas korespondantoj por lingvoj germana, franca, angla, itala, hispana kaj internacia.

La redakcio.

### Sciigoj al la amikoj.

Mi intencas propagandigi nian aferon per tio, ke mi parolados pri la lingvo Esperanto en diversaj urboj de nia patrujo. El tiu ĉi kaŭzo kredeble la nua numero de nia gazeto eliros ne pli frue ol ĝis monato Septembro. Tial mi petas ĉiujn abonantojn pardoni tian neakuratecon.

Kelkaj amikoj sendis jam ofte al mi poŝtkartojn kaj ankaŭ leterojn sen sufiĉa poŝtpago, kio kaŭzis al mi multajn elspeĉojn. Tial mi petas humile ilin preni ĉiam poŝtkartojn internacian.

Koran dankon al la amikoj, kiuj sendis al mi poŝtsignojn kasitajn. Ilia ekzemplo trovu imitadon.

La „Kondukanto Internacia“ de A. Grabowski estas jam plejparte presita kaj ĝi eliros kredeble post plej mallonga tempo.

Tiu abonantoj de nia gazeto, kiuj ĝis nun sendis al la redakcio la abononpagon por la monatoj Oktobro, Novembro kaj Decembro volu havi la bonecon kaj sendi nun ĝin por la unua kaj dua kvarono de kuranta jaro.

Al s-ro S. A. Bogoslawski. Sendu baldaŭ al mi Vian manuskripton. Saluton.

### Klarigo.

Mi permesis al mi ŝanĝi la fundamenton de l' Regularo proponita de dro Esperanto por la Ligo en kelkaj punktoj, de kiuj estas la plej grava la redukcio de la mona pago al la kaso de l' Ligo flanke de l' kluboj. Diversaj kaŭzoj necesigas la tuŝantajn ŝanĝojn. Kiu deziras detalajn sciigojn pri tiu ĉi afero, volu sin turni al la redakcio. Samatempe

mi petas ĉiujn kunlaborantojn de nia gazeto ĉiam sciigi min ĉu mi devas ŝanĝi iliajn ellaboratojn aŭ ne, por ke mi ne pli kaŭzos malagrablecojn al ia de nia amikoj.

La redakcio.

### Deziro.

Tiuj el niaj amikoj, kiuj estas volonte preta doni iliajn nomojn kiel subskribado en la intereso de nia lingvo, volu tuj post la ricevo de tiu ĉi numero de nia gazeto sendi iliajn konsentojn kun la kondiĉojn per kiuj ili permesas uzi iliajn estimatajn nomojn por absolute necesaj apeloj kaj invitoj, kiujn ni lasos presi en diversajn gazetojn.

La redakcio.

### Sciigoj al la provizora administra komitato de l' Ligo.

Al la kaso de l' Ligo alportis sekvantaj sinjoroj:

- 1) N. H. en P. 1 rublon,
- 2) W. T. " " 1 "
- 3) A. F. " " 1 "
- 4) C. H. " A 6 "

kune 9 rublon. Koran dankon! /oj

### Novajo.

S-ro de Majnov en Petroburgo tradukis la dramon „Renaskita Manfred“ de Plejaŭgustusa prezidanto de Rusa Akademio de sciencoj Granda Princo Konstantin Konstantinoviĉ kun la permeso de Lia Imperiestrida Moŝto. Mi esperas trovi baldaŭ libristo, kiu eldonos tiun ĉi belan tradukon. /on

Sekvantaj sinjoroj aliĝis al la Klubo Esperanto en Nürnberg:

- 1) J. Heinlein Ferreira en Lisabon,
- 2) S. A. Bogoslawski en A.,
- 3) Dro. D. Marignoni en Crema.

Tiaj klubanoj de l' Nürnberga Klubo, kiuj ne loĝas en Nürnberg, pagas por jaro ne pli ol la regularo de l' Ligo postulas, t. e. 2 markojn 40 pfennigojn. /d

## Anoncoj.

### Riĉard Geoghegan

en Birkenhead, Anglujo,

instruas senpage lingvon „Esperanto“ kaj per lingvo „Esperanto“ ankaŭ lingvojn anglan, hindustan kaj cinan.

Senpage instruas la lingvon Esperantan Vladimir Vladimiroviĉ de Majnov en S. Peterburg.

### La presejo de W. Tümmel en Nürnberg,

de kiu tiu ĉi gazeto estas presata, rekomandas sin por ĉiuj presa laboroj.

### G. Zechmeyer en Nürnberg.

Plej granda komerco de la poŝtsignoj.

Ĉiuj kasitaj poŝtsignoj estas aĉetataj kaj ŝanĝataj.

Alle gebrauchten Briefmarken werden gekauft und umgetauscht.

Speziala instruado  
de  
**LIBROTENADO**  
kaj komercaj kalkuloj

per korespondado en lingvoj: rusa kaj internacia. La rekompenco estas tre modera. Prospektoj kaj provajn leterojn mi sendas al ĉiu, kiu sendos al mi unu poŝtsignon (de ĉia lando).

Mia adreso estas:

**Julius Levik**  
Belaja-Cerkow (Kiev).